

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

“Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue” (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
Stampato da Centro Grafico Pirola-Lissone (MB)

Anno 100 - n.2 /2021
aprile/maggio/giugno

FRATECO KAJ ESPERO

Unua vizito de Papo en la lando de Abrahamo

De la 5-a ĝis la 8-a de Marto Papo Francisko vojaĝis al Irako por viziti la urbojn Bagdado, Naĝafo, Ur, Arbil, Mosulo kaj Qaraqosh. Li faris kvar paroladojn, du predikojn, gvidis Anĝeluson kaj preĝon por la animripozado de la militaj viktimoj. Akompanis lian vojaĝon ankaŭ la logoo kaj la devizo:

“Vi ĉiuj estas fratoj”



Dal 5 all'8 marzo Papa Francesco si è recato in Iraq visitando le città di Bagdad, Najaf, Ur, Erbil, Mosul e Qaraqosh.

Ha pronunciato quattro discorsi, due omelie, un Angelus e una preghiera di suffragio per le vittime della guerra. Ad accompagnare il suo viaggio anche il logo e il motto:

“Siete tutti fratelli”

«Mi venas kiel pilgrimanto, kiel pilgrimanto pentofara por humile peti al la Sinjoro pardonon kaj repaciĝon post jaroj de milito kaj de terorismo, por peti al Dio la konsoladon de la koroj kaj la resaniĝon de la vundoj. Kaj mi venas inter vi kiel pilgrimanto de paco, por rediri: “Vi ĉiuj estas fratoj” (Mat 23, 8).

Jes, mi venas kiel pilgrimanto de paco serĉe al frateco, plena je la deziro preĝi kune kaj kune paŝi, ankaŭ kun la fratoj kaj fratinoj de aliaj

«Vengo come pellegrino, come pellegrino penitente per implorare dal Signore perdono e riconciliazione dopo anni di guerra e di terorismo, per chiedere a Dio la consolazione dei cuori e la guarigione delle ferite. E giungo tra voi come pellegrino di pace, a ripetere: “Voi siete tutti fratelli” (Mt 23,8). Sì, vengo come pellegrino di pace in cerca di fraternità, animato dal desiderio di pregare insieme e di camminare insieme,

religiaj tradicioj, en la signo de la patro Abrahamo, kiu kunigas en unusola familio islamanojn, hebreojn kaj kristanojn».

«Mi havas la honoron renkonti Eklezion martiran: dankon pro via atesto! La multaj, tro multaj martiroj, kiujn vi konis, povu helpi nin persisti en la humila forto de la amo. Vi daŭre havas en la okuloj la bildojn de la detruitaj domoj kaj de la profanitaj preĝejoj, kaj en la koro la vundojn de karuloj forlasitaj kaj de forlasitaj loĝejoj.

Mi ŝatus porti al vi la kareson ameman de la tuta Eklezio, kiu estas apud vi kaj apud la suferanta Proksima Oriento kaj kiu kuraĝigas vin iri antaŭen».

«El vi, antaŭ pluraj jarmiloj, Abrahamo komencis sian vojaĝon. Hodiaŭ ni havas la taskon daŭrigi ĝin, kun la sama spirito, traitante kune la vojojn de la paco! Pro tio mi alvokas sur vin ĉiujn la pacon kaj la benon de la Plejaltulo. Kaj al vi ĉiuj mi petas fari la samon kiel Abrahamo: paŝi en la espero kaj neniam ĉesi rigardi la stelojn».

Papo Francisko

*videomesaĝo sendita
antaŭ la Apostola Vojaĝo al Irako*

anche con i fratelli e le sorelle di altre tradizioni religiose, nel segno del padre Abramo, che riunisce in un'unica famiglia musulmani, ebrei e cristiani».

«Sono onorato di incontrare una Chiesa martire: grazie per la vostra testimonianza! I tanti, troppi martiri che avete conosciuto ci aiutino a perseverare nella forza umile dell'amore. Avete ancora negli occhi le immagini di case distrutte e di chiese profanate, e nel cuore le ferite di affetti lasciati e di abitazioni abbandonate.

Vorrei portarvi la carezza affettuosa di tutta la Chiesa, che è vicina a voi e al martoriato Medio Oriente e vi incoraggia ad andare avanti».

«Da voi, millenni fa, Abramo incominciò il suo cammino. Oggi sta a noi continuarlo, con lo stesso spirito, percorrendo insieme le vie della pace! Per questo su tutti voi invoco la pace e la benedizione dell'Altissimo. E a tutti voi chiedo di fare lo stesso di Abramo: camminare nella speranza e mai lasciare di guardare le stelle».

Papa Francesco

*videomessaggio inviato
prima del Viaggio Apostolico in Iraq*



La plej signifoplenaj frazoj de la papa vojaĝo

Le frasi più significative del viaggio papale

El la parolado de Papo Francisko en la Esplanado de Ur, okaze de la interreligia renkontiĝo de la 6-a de Marto 2021

«Kiam la terorismo invadis la nordan parton de tiu ĉi kara lando, ĝi barbare detruis parton de ĝia mirinda religia posedaĵo, inter kiuj preĝejoj, monaĥejoj kaj kultejoj de pluraj komunumoj.

Sed ankaŭ en tiu malluma momento briladis steloj. Mi pensas al la junaj islamaj volontuloj de Mosulo, kiuj helpis rekonstrui preĝejojn kaj monaĥejojn, konstruante fratecajn amikecojn super la rubaĵoj de la malamo;

Dal discorso di Papa Francesco nella Piana di Ur, in occasione dell'incontro interreligioso del 6 Marzo 2021

«Il terrorismo, quando ha invaso il nord di questo caro Paese, ha barbaramente distrutto parte del suo meraviglioso patrimonio religioso, tra cui chiese, monasteri e luoghi di culto di varie comunità. Ma anche in quel momento buio sono brillate delle stelle. Penso ai giovani volontari musulmani di Mosul, che hanno aiutato a risistemare chiese e monasteri, costruendo amicizie fraterne sulle macerie

kaj al la kristanoj kaj islamanoj kiuj hodiaŭ restaŭras kune moskeojn kaj preĝejojn».


«Ni ne ebligu, ke la lumo de Kristo estu kovrita de la nuboj de malamo. Super tiu ĉi lando ariĝis la mallumaj nuboj de terorismo, de milito kaj de perforto. Pro ili suferis ĉiuj komunumoj etnaj kaj religiaj. Mi deziras rememorigi aparte tiun jezidan».

«Estas nia tasko memorigi al la mondo, ke la homa vivo valoras laŭ tio, kio ĝi estas kaj ne laŭ tio, kion ĝi posedas; kaj ke la vivoj de la naskiĝontoj, tiuj de maljunuloj, de migrantoj, de viroj kaj de virinoj de ĉiaj koloro kaj nacieco estas ĉiam sanktaj kaj valoras tiom, kiom tiuj de ĉiuj aliaj! Estas nia tasko havi la kuraĝon levi la okulojn kaj rigardi la stelojn, la stelojn, kiujn vidis nia patro Abrahamo, la stelojn de la promeso».

dell'odio, e a cristiani e musulmani che oggi restaurano insieme moschee e chiese».


«Non permettiamo che la luce del Cielo sia coperta dalle nuvole dell'odio. Sopra questo Paese si sono addensate le nubi oscure del terrorismo, della guerra e della violenza. Ne hanno sofferto tutte le comunità etniche e religiose. Vorrei ricordare in particolare quella yazida».

«Sta a noi ricordare al mondo che la vita umana vale per quello che è e non per quello che ha, e che le vite di nascituri, anziani, migranti, uomini e donne di ogni colore e nazionalità sono sacre sempre e contano come quelle di tutti! Sta a noi avere il coraggio di alzare gli occhi e guardare le stelle, le stelle che vide il nostro padre Abramo, le stelle della promessa».



Le foto delle vittime dell'attentato terroristico del 2010

Fotoj de la viktimoj de la terorisma atenco de 2010



La cattedrale siro-cattolica "Nostra Signora della Salvezza" a Bagdad, teatro di un attacco suicida da parte dell'Organizzazione per lo Stato islamico in Iraq, braccio iracheno di al-Qaeda, durante la Santa Messa domenicale del 31 ottobre 2010. Il Papa vi ha incontrato i vescovi, sacerdoti, seminaristi e catechisti.

La siri-katolika katedralo "Nia Sinjorino de la Savo" en Bagdado, la loko de memmurda atako de la Organizaĵo por la Islama Ŝtato en Irako, la iraka branĉo de Al-Kaida, dum la dimanĉa Meso de la 31-a de Oktobro 2010. La Papo renkontis tie episkopojn, pastrojn, seminarianojn kaj katekistojn.

Atesto de sinjorino Rafah Husein Baher de la Manda' religio

«La maljusteco frapis ĉiujn irakanojn, via Sankteco. Mi povas atesti, ke ĝi flankenlasis neniun: senkulpa sango estis verŝita el ĉiuj irakanoj. La terorismo profanis nian dignon senhonte.

Multaj landoj, sen konscienco, taksis niajn pasportojn senvaloraj, rigardante kun indiferenteco niajn vundojn. La vizito de Via Sankteco en Irako signifas, ke Mezopotamio estas daŭre respektata kaj ŝatata.

Via vizito signifas triumfon de virtoj, ĝi estas simbolo de estimo por la irakanoj».

Testimonianza della sig.ra Rafah Husein Baher di religione Manda'

«L'ingiustizia ha colpito tutti gli iracheni, Santità. Posso testimoniare che non ha escluso nessuno: sangue innocente è stato versato da tutti gli iracheni. Il terrorismo ha violato la nostra dignità con impudenza.

Molti Paesi, senza coscienza, hanno classificato i nostri passaporti come privi di valore, guardando le nostre ferite con indifferenza. La visita di Sua Santità in Iraq significa che la Mesopotamia è ancora rispettata e apprezzata.

La Sua visita significa un trionfo di virtù, è un simbolo di apprezzamento per gli iracheni».



Atesto de Kardinalo Louis Raphaël Sako Patriarko de Babilono de la Ĥaldeoj

«Nia ĉeesto kiel kristanoj en Irako kaj en Oriento ne estas hazarda afero kaj ne havas la celon elmigri, sed okazas laŭ dia plano. Ni havas vokiĝon kaj mision, kiun ni ne povas rezigni malgraŭ la malfacilaĵoj».



Testimonianza del card. Louis Raphaël Sako, Patriarca di Babilonia dei Caldei

«La nostra presenza come cristiani in Iraq e in Oriente non è un caso o per emigrare, ma è secondo un piano divino. Noi abbiamo una vocazione e una missione alla quale non possiamo rinunciare nonostante le difficoltà».



*Incontro interreligioso a Ur.
La interreligia renkontiĝo en Ur.*

LA BELECO DE LA KREDO

La nostra asociata Nora Saccardo, volontaria dell'associazione AES-CCC di Padova, ci fa conoscere questa bellissima storia.

Nia membrino Norma Saccardo, volontulino de la asocio AES-CCC en Padova, konigas al ni ĉi tiun belegan historion.



Ivana Borsotto, presidente FOCSIV, **Mons. Luigi Bressan**, rappresentante della CEI in FOCSIV e **Lucilla Nuccitelli**, responsabile del Laboratorio di restauro dell'Istituto centrale per la patologia degli archivi e del libro, presentano il Santo Libro Sidra a Papa Francesco.

Ivana Borsotto, prezidantino FOCSIV, **Monsinjoro Luigi Bressan**, reprezentanto de CEI ĉe FOCSIV kaj **Lucilla Nuccitelli**, respondeculino de la restaŭrad-laboratorio de la centra Instituto pri patologio de arkivoj kaj libroj, prezentas la Sanktan Libron Sidra al Papo Francisko.

Papo Francisko, dum la renkontiĝo por preĝado en la Katedralo "Senmakula Koncipiĝo" de urbo Qaraqosh (Irako), redonis al la ĉefepiskopo de Mosul, Yohanna Butros Mouché, la sanktan libron Sidra apartenantan al la siriaka-katolika Eklezio de la plej grava kristana urbo de la iraka Kurdistan: Qaraqosh en la antikva ebenaĵo de Ninive.

Sidra kolektas la liturgiajn preĝojn en la aramea lingvo, sed skribitajn per siriag karakteroj, por la periodo inter la festo de Pasko kaj tiu de la Sankta Kruco kaj ĝi estas datita inter la 14-a kaj la 15-a jarcento.

Papa Francesco, durante l'incontro di preghiera nella cattedrale dell'Immacolata Concezione della città di Qaraqosh (Iraq) ha restituito all'arcivescovo di Mosul, Yohanna Butros Mouché il libro sacro Sidra appartenente alla Chiesa siriaca-cattolica della più importante città cristiana del Kurdistan iracheno: Qaraqosh, nell'antica Piana di Ninive.

Sidra raccoglie le preghiere liturgiche in aramaico, ma trascritte in caratteri siriaci, per il periodo fra la festa della Pasqua e quella della Santa Croce ed è datato tra il 14° e il 15° secolo.

La libro, dank'al ruzaĵo de la sacerdotoj de tiu urbo, saviĝis el la ikonoklasta kaj kontraŭkristana furiozo de la homoj de Daesh, kiuj de 2014 ĝis Marto de 2017 okupaciis kaj disrabis tiujn terojn.

Trovita en Erbil januare de 2017 fare de ĵurnalistoj Laura Aprati kaj Marko Bova, la Sankta Libro estas poste transdonita de la ĉefepiskopo de Mosul, Monsinjoro Yohanna Butros Mouché, en la manojn de la volontuloj de FOCSIV. Dank' al sindevigo de la tiama Ministro pri la kulturaj agadoj kaj turismo, Dario Franceschini, kaj de Giulia Silvia Ghia, prezidantino de "Verderame kultura projekto", la altvalora Manuskripto atingis Italion post nur 40 tagoj.

Ĉe la ICRCPAL – Centra Instituto pri Restaŭrado kaj Konservado de la Arkiva Havaĵo – per delikata senpaga laboro, kiu daŭris dum preskaŭ du jaroj, multaj fakuloj ĝin restaŭris respektante iujn ĝiajn karakterizojn, kiel la antikvan bindadon kaj la tre specialan inkon utiligitan por la miniaturoj.

Il volume, grazie ad un'astuzia dei sacerdoti di quella città, era scampato alla furia iconoclasta e anticristiana degli uomini del Daesh che dal 2014 al marzo 2017 occuparono e devastarono quelle terre.

Individuato ad Erbil nel gennaio 2017 dai giornalisti Laura Aprati e Marco Bova, Libro Sacro è stato, successivamente, consegnato dall'Arcivescovo di Mosul, Monsignor Yohanna Butros Mouché, nelle mani dei volontari FOCSIV. Grazie all'impegno dell'allora Ministro dei beni e delle attività culturali e del turismo, Dario Franceschini, e di Giulia Silvia Ghia, presidente di Verderame progetto cultura, il prezioso Manoscritto è stato fatto arrivare in soli 40 giorni in Italia.

Presso l'ICRCPAL - Istituto Centrale per il Restauro e la Conservazione del Patrimonio Archivistico, con un delicato lavoro gratuito di quasi due anni, numerosi esperti lo hanno restaurato rispettando alcune sue peculiarità come l'antica rilegatura e l'inchiostro molto particolare usato per le miniature.



Papa Francisko e mons. Yohanna Butros Mouché. *Papo Francisko kaj Monsinjoro Yohanna Butros Mouché.*



Pagina di Sidra con miniatura prima del restauro: il libro si presentava in condizioni molto critiche.

Paĝo de Sidra kun miniaturo antaŭ la restaŭrado: la libro prezentiĝis en tre krizaj kondiĉoj.

La strukturo de la volumo estis tre kompromitita, la kondiĉoj de la miniaturoj kaj de la inkoj de la skribaĵo estis aĉegaj, la rompiĝemaj paperoj kaj la lignaj aksoj de la bindado estis rompitaĵoj.

La Manuskripto havis sennombrajn makulojn el vakso de la kandeloj utiligitaj por ĝia legado. Simplaj riparoj estis plenumitaj per glubendoj. Dum la tempopaso iuj miniaturoj estis ankaŭ fortranĉitaj kaj aliaj estis kovritaj per "fuŝflikaj" el papero.

La ununura origina elemento de la Libro, kiun nepre necesis anstataŭigi, estis la kudro-fadeno de la kajeroj.

Ĝi estas kromnomita "Rifuĝinta Libro", kiel la loĝantoj de tiu teritorio, kaj ĝi atestas la detruon de pluraj loĝantaroj kaj de tutaj teritorioj.

La celo de la homoj de la Ĝihado estis forviŝi la memoron de la homoj, neniigante la spurojn, bruligante librojn kaj kaŭzante la definitivon malaperon de kelkaj popoloj, de iliaj tradicioj, de ilia lingvo.

Tamen eblas, per la reakiro de kulturaj atestoj, rekonstrui la socian tekstaĵon de teritorio, rekreante la kondiĉojn por revivigi komunumon kun ĝiaj malsamecoj kaj ĝiaj specifaj identecoj.

Sidra, kvankam senkapa kaj kripligita en la finaj paĝoj, daŭre skandos la liturgian jaron en la aramea lingvo kaj ĝi estos ankoraŭ ĉantata por la popolo de la Esplanado de Ninive, memorigante al ĉiuj, ke alia estonteco ja ĉiam estas ebla.

(esperantigis Norma Cescotti Covelli)

Grazie all'interessamento di Norma Saccardo l'associazione FOCSIV ci ha autorizzato a pubblicare la foto della presentazione del libro sacro al Papa. FOCSIV è una federazione italiana di Organismi cristiani di cooperazione e volontariato internazionale di cui fa parte l'associazione AES-CCC.

Dank'al interesiĝo de Norma Saccardo, asocio FOCSIV rajtigis nin publikigi la foton pri la prezentado de la Sankta Libro al la Papo. FOCSIV estas itala federacio de kristanaj organizaĵoj pri kunlaborado kaj internacia volontula servo, al kiu aliĝas asocio AES-CCC

<https://www.focsiv.it>

<http://www.aes-ccc.org>

La struttura del volume era molto compromessa, la condizione dei pigmenti delle miniature e degli inchiostri della scrittura era pessima, le carte fragili e le assi lignee della legatura erano fratturate.

Il Manoscritto aveva innumerevoli macchie di cera delle candele adoperate per la sua lettura. Semplici riparazioni erano state eseguite con nastri adesivi. Nel tempo erano state anche tagliate via delle miniature mentre altre erano state coperte con 'pecette' di carta.

L'unico elemento originale del Libro, che è stato indispensabile sostituire, è stato il filo di cucitura dei fascicoli.

È stato soprannominato "Libro profugo" come gli abitanti di quel territorio e testimonia la distruzione di diverse popolazioni e interi territori.

L'intenzione degli uomini della Jihad era di cancellare la memoria degli uomini, distruggendo le vestigia, bruciando libri e provocando la definitiva scomparsa di alcuni popoli, delle loro tradizioni, della loro lingua. Tuttavia è possibile, con il recupero delle testimonianze culturali, ricostruire il tessuto sociale di un territorio, ricreando le condizioni per rivivificare una comunità con le sue differenze e le sue identità specifiche.

Sidra, seppur acefalo e mutilato nelle pagine finali, continuerà a scandire l'anno liturgico in aramaico e ad essere ancora cantato per la gente della Piana di Ninive, ricordando a tutti che un altro futuro è pur sempre possibile.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS



La 21an de marto 2021 en Romo forpasis nia membro **Antonio De Salvo** (08.06.1942-21.03.2021)

Li estis juristo, ĵurnalisto kaj esperantisto. Li ekaktivis en la romkatolika asocio IKUE kaj en ĝia tiama junulara asocio "La Alta Flugo". Li estis prezidanto de IKUE (1995-2003), redaktoro de *Espero Katolika* (1978-92), redaktoro de la Esperantaj programoj de RAI Itala Radio Internacia (1971-2007), vicprezidanto de LKK (Loka Kongresa Komitato) de la 91a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco (2006) kaj prizorgis kelkajn gravajn leksikografiajn kaj interretajn projektojn.

Il 21 marzo 2021 a Roma è morto il nostro socio Antonio De Salvo (08.06.1942-21.03.2021). È stato un giurista, giornalista ed esperantista. Divenne attivo nell'associazione cattolica IKUE e nell'allora associazione giovanile "La Alta Flugo". È stato presidente dell'IKUE (1995-2003), direttore di *Espero Katolika* (1978-92), direttore dei programmi in esperanto della RAI Radio Italiana Internazionale (1971-2007), vicepresidente del Comitato locale del 91° Congresso Universale di Esperanto a Firenze (2006) e ha gestito una serie di importanti progetti lessicografici in rete.



MEMORE al ANTONIO

Volonte mi verkas penson pri la personeco de Antonio De Salvo, kiun mi eklernis ekde nia unua renkontiĝo en 1978.

El la aspektoj de la karaktero de Antonio, tiu, kiu plej tuŝis min estis la pacienco.

Oni rimarkis lian klarecon, la profundan rezonadon, kunigitajn kun granda afableco.

Kaj en ĉiu lia faro, en ĉiu agado kaj dialogo, mi perceptis ĝuste grandan paciencon.

Oni ne komprenu ĝin kiel tediĝon, penigan eltenon, sed kiel apartigon meminitatan de tio, kio oni estas, kaj resti je dispono por helpi, subteni, kuraĝigi, atenti, per stilo de ĝentileco kaj simpleco.

Ĉu temu nur pri respondo al demando el tiuj pli banalaj.

Scrivo volontieri un pensiero sulla personalità di Antonio De Salvo, che ho imparato a conoscere fin dal nostro primo incontro nel 1978.

Tra gli aspetti del carattere di Antonio che mi hanno colpito maggiormente c'era la pazienza. Si notavano la sua cultura, il profondo ragionamento, uniti a grande affabilità. E in ogni suo modo di fare, in ogni attività e dialogo, percepivo proprio una grande pazienza. Da non comprendere come noia, faticosa sopportazione, ma come un mettere da parte naturalmente ciò che si è, e restare a disposizione per aiutare, sostenere, incoraggiare, prestare attenzione, con uno stile di cortesia e semplicità. Fosse anche dare una risposta a una domanda che fosse tra le più banali.

Ĉu oni devu rimarkigi pri la plia, neevitebla manko de akuzativo kiam oni parolas en Esperanto.

Ĉi tiun lian sintenon multaj rimarkis sufiĉe frue, transirante poste al admiro, eksciinte, kiun publikan aŭtoritatulon oni havis fronte al si.

Aliflanke, tiuj, kiuj konis pri li nur tion, ke li estis juĝisto – kaj sekve alirante al li kun la “ŝuldita” respektema sinteno – estis tuj kaptitaj, ankaŭ ili, de surprizo kaj transiris al kompleta admiro.

Sed, ambaŭkaze, tiun admiron oni devis mem konstati, ĉar Antonio, pro sia humileco, ne estigus ĝin intence, des malpli celus ĝin.

Ĝi estas karakterta trajto de granda homo, vere granda.

Fosse anche di dover segnalare l'ennesima, inevitabile mancanza dell'accusativo, quando si parlava in Esperanto.

Questo suo atteggiamento lo notavano molti ben presto, passando poi all'ammirazione nel venire a sapere quale personalità pubblica si aveva avuto di fronte.

Per altri versi, chi conosceva di lui soltanto il fatto che fosse un Magistrato - e perciò gli si avvicinava con il “dovuto” atteggiamento reverenziale - veniva colto, anche lui, dalla sorpresa e passava alla piena ammirazione.

Ma in entrambi casi, a quell'ammirazione bisognava arrivarci da soli, perché Antonio, con la sua umiltà, non l'avrebbe provocata intenzionalmente, né tanto meno cercata.

Un tratto caratteriale da grande persona, davvero grande.

Carlo Sarandrea



Il Presidente dell'IKUE, dottor Antonio De Salvo rivolge il proprio saluto al Presidente della Repubblica Oscar Luigi Scalfaro.

La prezidanto IKUE Antonio De Salvo kun la prezidanto UECI Mario Sola dum la renkontiĝo kun la prezidanto de la itala republiko Oscar Luigi Scalfaro

(50a internacia kongreso IKUE 1997)

KREDO kaj SOCIETO

Vivi la krizon de kron-viruso

Tri aspektoj, kiuj estas helpodonaĵoj dum la problemodonaĵoj situacioj: la **engaĝiĝo**, kiel kapablo de kuntreniĝo: antaŭ problemoj, anstataŭ pasive enmigi, oni eklaboras kaj klopodas alporti la propran kontribuon, sciante, ke ĝi povas esti grava por iu; la **kontrolo**: preni en la proprajn manojn la rimenojn de la situacio en la konvinkiĝo havi ĉiam iun povon uzeblan, negrave ĉu grandan aŭ malgrandan; la **gusto por la defio**, kiu donas la eblon vivi la malfacilaĵojn kiel eblajn oportunecojn je dispono kaj ne nur kiel minacon, engaĝigante en ili, anstataŭ limiĝi al sopiranta penso pri la pasinta tempo.



Ili estas tri aspektoj ligitaj al la konscio, ke ili povas esti edukataj kaj plifortigitaj. Alia grava elemento, kapabla favori la rezistemon, estas la ĉeesto de signifoplenaj afekciaj interrilatoj.

Kunteksto stabila kaj celanta al la estimo kaj al la empatio helpas en la plenumigo de eblaj dotoj kaj kapabloj, kiuj montriĝas fundamentaj por alfronti la tragikajn eventojn. (kp A. Oliverio Ferraris).

«La subteno de la komunumo, de la valoroj kaj de la tradicioj, kiuj ĉeestas en ĝi, plifortigas ĝiajn anojn kaj malkonfesas la individuistan postulaton de la homo “kiu realiĝas per si mem”. Male, por la sano estas multe pli

Vivere la crisi del coronavirus

Tre aspetti che sono di aiuto nelle situazioni problematiche: l'**impegno**, come capacità di coinvolgimento: di fronte al problema, invece di ripiegarsi passivamente su di sé, ci si rimbecca le maniche e si cerca di portare il proprio contributo, sapendo che potrà essere importante per qualcuno; il **controllo**: prendere nelle proprie mani le redini della situazione nella convinzione di avere sempre un potere da esercitare, grande o piccolo non importa; il **gusto per la sfida**, che consente di vivere le difficoltà come possibili opportunità a disposizione e non solo come una minaccia, impegnandosi in esse, invece di limitarsi a rimpiangere il tempo passato.



Sono tre aspetti legati alla consapevolezza, che possono cioè essere educati e potenziati. Un altro elemento importante, in grado di favorire la resilienza, è la presenza di significative relazioni affettive.

Un contesto affettivamente stabile e improntato alla stima e all'empatia aiuta a esplicitare possibili doti e capacità che risultano fondamentali per affrontare gli eventi tragici (Cfr A. Oliverio Ferraris).

«Il supporto della comunità, dei valori e delle tradizioni in essa presenti rafforza i suoi appartenenti e smentisce il postulato individualistico dell'uomo che “si fa da sé”. Risulta invece molto più dannosa per la

danĝera iu vivo soleca kaj superprotektata, sen grandaj problemoj, kompare kun evento tragika sed alfrontata kun la subteno de fortaj kaj profundaj ligitecoj. “Se mi havas fidon je vi kaj mi esperas farti pli bone, mia cerbo komencas produkti naturajn kontraŭdolorilojn kaj la doloro malkreskas». (F. Benedetti).

Certe, aldonas la aŭtoro, la potenco de la vorto montriĝas ankaŭ en negativa flanko: ĝi povas dolorigi en maniero multe pli ruiniga ol fizika ago, ĝis la mortigo. La samon oni povas diri por la agoj de helpo al la suferantoj: tio, kio malsamas, pli ol la kompetenteco aŭ la sperto, estas la kapablo starigi interrilatojn empatiajn kaj kompatemajn.

La kvalito de la rilatoj kaj iu profunda interna vivo estas helpoj potencaj kontraŭ la malbono, ankaŭ manke de taŭga kuracista ekspertizo. Kaj ili estas motivo de granda helpo por la aliaj. Nenio povas kompensi la valoron de veraj interrilatoj: ili estas potenco formo de protektado kaze de minacoj, kaj estas ebleco esprimi la plej bonan parton de si mem.

Ĉiu homo estos memorata precipe pro tio, kion li amis, pli ol pro tio, kion li faris. Papo Francisko, pridemandita de iu ĵurnalo pri la ebla signifo de la okazanta urĝa situacio, asertas:

«Ni devas trovi la konkretecon de la etaj aferoj, de la malgrandaj prizorgoj havendaj por tiuj, kiuj estas apud ni, por familianoj kaj geamikoj. Kompreni, ke en la etaj aferoj estas nia trezoro. Estas minimumaj gestoj, kiuj kelkfoje perdiĝas en la anonimeco de la ĉiutageco, gestoj de tenereco, de amemo, de kompatemo, kiuj tamen estas decidaj, gravaj. Ekzemple, varma manĝaĵo, kareso, brakumo, telefonvoko... La familiaj gestoj de zorgemo por la ĉiutagaj detaloj igas, ke la vivo havu sencon, kaj ke estu kunuleco kaj komunikado inter ni». Papo Francisko, la 18-an de Marto 2020.

(esperantigis F.Fagnani)

salute una vita solitaria iperprotetta, senza grandi problemi, rispetto a un evento tragico, ma affrontato con il supporto di legami forti e profondi. “Se io ho fiducia in te e spero di stare meglio, il mio cervello inizia a produrre degli antidolorifici naturali e il dolore diminuisce» (F. Benedetti).

Certo, aggiunge l'autore, la potenza della parola si mostra anche in negativo: essa può fare male in maniera molto più devastante di un'azione fisica, fino a uccidere. Lo stesso può dirsi per le relazioni di aiuto a chi soffre: ciò che fa la differenza, più che la competenza e l'esperienza, è la capacità di instaurare relazioni empatiche e compassionevoli. La qualità delle relazioni e una profonda vita interiore sono aiuti potenti contro il male, anche in assenza di un'adeguata perizia medica. E sono motivo di grande aiuto per gli altri. Niente può compensare il valore delle relazioni autentiche: esse sono una forma potente di protezione di fronte alle minacce, e una possibilità di esprimere il meglio di sé.

Ogni persona sarà ricordata soprattutto per ciò che ha amato, più che per ciò che ha fatto. Papa Francesco, interpellato da un quotidiano sul possibile significato dell'emergenza in corso, afferma: «Dobbiamo ritrovare la concretezza delle piccole cose, delle piccole attenzioni da avere verso chi ci sta vicino, famigliari, amici. Capire che nelle piccole cose c'è il nostro tesoro. Ci sono gesti minimi, che a volte si perdono nell'anonimato della quotidianità, gesti di tenerezza, di affetto, di compassione, che tuttavia sono decisivi, importanti. Ad esempio, un piatto caldo, una carezza, un abbraccio, una telefonata... Sono gesti familiari di attenzione ai dettagli di ogni giorno che fanno sì che la vita abbia senso e che vi sia comunione e comunicazione fra noi». Papa Francesco 18 marzo 2020.

Don S.Rinaldi

FONDUSO “ALFABETIGO”



Infanvartejo Maria Maddalena - Sisak

<http://www.biskupija-sisak.hr/index.php/tijela-biskupije/dv-sela>

La 29-an Decembro 2020 la ĉirkaŭa zono de urbo Sisak en Kroatio estis trafita de terura tertremo, kiu eldetruis urbon Petrinja, kaŭzante multajn mortintojn.

La diocezon estras Episkopo Monsinjoro Vlado Košić, tre konata de multaj el ni ĉar, dum la IKUE kongreso en la jaro 2011, li gastigis nin en la paroĥa domo, celebris meson kaj akompanis nin por viziti la ĉirkaŭajn lokojn.

Antaŭ kelkaj jaroj, la Episkopo Vlado Košić, decidis konstrui infanvartejon por helpi familiojn prizorgi siajn infanojn kaj sian religian edukadon. Li asertis: “Nia kristana devo estas prizorgi la plifortigon kaj la progreson de kristanaj kroataj familioj, helpi ilin spirite kaj, laŭeble, ankaŭ materie ĉar ne ekzistas Eklezio aŭ Nacio sen sanaj kaj fortaj familioj.

Gravas prizorgi infanojn ĉar en la tuta Kroatio la demografiaj datenoj estas negativaj, do ni ĉiuj estas devigataj subteni familiojn kun infanoj».

Il 29 dicembre 2020 la zona circostante la città di Sisak in Croazia è stata colpita da un terribile terremoto che ha raso al suolo la città di Petrinja causando anche molti morti. La diocesi di Sisak è guidata dal Vescovo mons. Vlado Košić che molti di noi conoscono perché, durante il congresso IKUE del 2011, ci ha ospitato nella casa parrocchiale, ha celebrato la messa e ci ha accompagnato in visita nei luoghi circostanti.

Il vescovo Vlado Košić, qualche anno fa, ha deciso di fondare un asilo nido per aiutare le famiglie nell'accudimento dei piccoli e nella loro educazione religiosa affermando che: “È nostro dovere cristiano curare il rafforzamento e il progresso delle famiglie cattoliche croate e aiutarle spiritualmente, e, per quanto possibile, materialmente perché non c'è Chiesa o nazione senza famiglie sane e forti.

È importante prendersi cura dei bambini perché il quadro demografico è negativo in tutta la Croazia, quindi, siamo tutti obbligati a sostenere le famiglie con bambini».

Malbonŝance ankaŭ ĉi tiun infanvartejon la tertremo damaĝis. Ĝi ricevas helpon nur de la paroĥo, kiu, en ĉi tiu momento, devas

plenumi la plej urĝajn materiajn bezonojn de la loĝantaro.

Kelkaj familioj, ekzemple, ne plu povas pagi la lernejan kotizon, ĉar ili perdis ĉion.

Sekve, UECI decidis donaci la sumon de la alfabetigo-fonduso por subteni paroĥan infanvartejon de Sankta Maria en Seli proksime al Sisak.

La IKUE prezidantino Marija Beloŝević persone zorgis pri la liverado de la mono.

Esperantigis Ida Bossi

Purtroppo anche questo asilo nido è stato danneggiato dal terremoto. Esso riceve aiuti solo dalla parrocchia che, in questo momento, deve

sopperire alle necessità materiali più urgenti della popolazione. Alcune famiglie, per esempio, non possono più pagare la retta perché hanno perso tutto.

UECI ha, così, deciso di devolvere il fondo per l'alfabetizzazione per sostenere l'asilo parrocchiale S. Maria Maddalena a Seli vicino a Sisak. La presidente IKUE Marija Beloŝević ha personalmente curato la consegna dei soldi.

T.F.



*Momento della visita a Sisak, durante il Congresso dell'IKUE a Zagabria 2011:
Monsignor Vlado Košić con i partecipanti al congresso
davanti alla cattedrale dell'“Esaltazione della Croce” a Sisak.*

*Momento de la vizito al Sisak, dum la IKUE Kongreso en Zagrebo 2011:
monsinjoro Vlado Košić kun la gekongresanoj
antaŭ la Katedralo “Gloro de la Kruco” en Sisak.*

25a DATREVENO DE LA FORPASO DE MONSINJORO LORENZO LONGONI

La 26an de Majo okazas la 25a datreveno de la forpaso de monsinjoro Lorenzo Longoni, nacia asistanto de la katolikaj esperantistoj kaj animo de la milana Katolika Esperanto-Centro, titolita al lia frato pastro Ferdinando Longoni, iama prezidanto de IKUE. Pastro Lorenzo alvenis al Esperanto sufiĉe malfrue en la jaro 1975, post la forpaso de la frato, kiam, heredante lian vastan bibliotekon, li havis la ŝancon ekkoni tiun ĉi medion.

Ĝis tiam, fakte, estis konata lia dubema sinteno por la valoro de iu idealo, la universala lingvo, kiu ne ŝajnis posedi estontecon, kaj lia milda maniero per kiu li parolis al la frato, ne komprenante lian engaĝiĝon kaj lian sindediĉon al iu tasko, kiu estis de li konsiderata "perdo de tempo".

Mi rememoras lian vizaĝon mirplenan kiam alvenis multaj atestoj de estimo kaj de kondolenco el la esperantista mondo okaze de la forpaso de pastro Ferdinando, kaj eĉ plie kiam, malfermante la multenombrajn skatolojn entenantajn la esperantistan bibliotekon de la frato, li trovis abundan nombron da esperantaj revuoj alvenantaj el la tuta mondo.

Tiel li volis kompreni kiamaniere estis grava la ĉeesto de la katolikoj ankaŭ en tiu ĉi kadro.

Tial, kontaĝita je la sama entuziasmo, kiun li konadis en pastro Ferdinando, li ekstudis Esperanton kaj komencis organizi la Milanan Esperanto-Centron, celebri la Sanktan Meson en Esperanto, organizi kunvenojn de studo kaj de pliprofundigo.

Ofte li bedaŭris esti perdinta tiom multe da tempo kaj ne esti kompreninta antaŭe kiel vastan kadron de apostoleco povis proponi



Il 26 maggio ricorre il 25° anniversario della morte di monsignor Lorenzo Longoni, assistente nazionale degli esperantisti cattolici e anima del Centro Esperantista Cattolico milanese intitolato al fratello don Ferdinando già presidente IKUE. All'esperanto don Lorenzo era giunto piuttosto tardi nel

1975, alla morte del fratello, quando, ereditando la vasta biblioteca di lui, ebbe modo di conoscere questa realtà.

Fino ad allora, infatti, era noto il suo atteggiamento dubbioso sul valore di un ideale, la lingua universale, che non sembrava avere futuro e il modo bonariamente sufficiente con cui ne parlava al fratello, non comprendendo il suo impegno e la sua dedizione ad una impresa da lui ritenuta "una perdita di tempo".

Ricordo il suo viso attonito quando arrivarono numerose attestazioni di stima e di cordoglio provenienti dal mondo esperantista per la morte di don Ferdinando e ancor più, quando aprendo i numerosi scatoloni che contenevano la biblioteca esperantista del fratello, trovò un numero cospicuo di riviste esperantiste che provenivano da tutto il mondo.

Allora volle capire perché era importante la presenza dei cattolici anche in questo ambito. Così, contagiato dallo stesso entusiasmo che avevo conosciuto in don Ferdinando, studiò l'esperanto e iniziò a organizzare il Centro Esperantista di Milano, a celebrare la S. Messa in esperanto, a organizzare convegni di studio e approfondimento.

Spesso si rammaricava di aver perso tanto tempo, di non aver capito prima quale vasto campo di apostolato la lingua esperanto

Esperanto, atingante ĉiun angulon de la tero per ilo tiom simpla kaj libera, ne estante ligita al iu nacio.

Pro tio li engaĝiĝis por konigi tiun ĉi lingvon en la diversaj kadroj de sia apostoleco, ek de la FOM (Federazione degli Oratori Milanesi).

Post kvarono da jarcento daŭre estas juste fari memoron, precipe en tempo dum kiu, el unu flanko, pro la pandemio, ŝajnas reviviĝi la intereso de multaj por Esperanto, el la alia flanko oni rimarkas ian penon arigi homojn, kiuj kune antaŭenportu ĉi tiun idealon en la eklezia kadro.

La ekzemplo kaj la sindediĉo de pastro Lorenzo subtenu nin, por ke ne estingiĝu la entuziasmo kaj la engaĝo por la anonco de la Regno en la esperantista mondo.

(esperantigis F.Fagnani)



Monsinjoro Longoni estis konvinkita esperantisto.

Alproksimiĝante al Esperanto en ne plu juna aĝo, li komprenis ĝian valoron kiel rimedon de internacia kompreno kaj amikeco, same kiel li plene komprenis la perfektan integriĝon de la celoj propraj de la kristano kun la celoj de la esperanta movado.

Sekve li partoprenis ĝoje kaj kun juna koro en esperantaj kongresoj kaj eventoj, komunikante la serenecon kaj la freŝecon de sia spirito.

poteva offrire, raggiungendo ogni angolo della terra con uno strumento così semplice e libero, non essendo legato ad alcun interesse nazionale.

Per questo si impegnò a far conoscere questa lingua nei diversi ambiti del suo apostolato a partire dalla FOM (Federazione degli Oratori Milanesi).

A distanza di un quarto di secolo rimane doveroso fare memoria soprattutto in un tempo in cui se da un lato, per effetto della pandemia, sembra riaccendersi l'interesse di molti verso l'esperanto, dall'altro si constata una certa fatica ad aggregare persone che insieme portino avanti questo ideale in campo ecclesiale. L'esempio e la dedizione di don Lorenzo ci sostengano affinché non abbia a spegnersi l'entusiasmo e l'impegno per l'annuncio del Regno nel mondo esperantista.

Marinella Bollini

Segretarino de pastro Ferdinando Longoni



Monsignor Longoni era un esperantista convinto.

Avvicinatosi all'esperanto in non più giovane età, ne aveva inteso il valore quale strumento di comprensione e amicizia internazionale così come aveva pienamente colto la perfetta integrazione delle mete proprie del cristiano con le finalità del movimento esperantista.

Perciò partecipava gioiosamente e con cuore giovanile ai congressi e manifestazioni esperantisti, comunicando la serenità e la freschezza del suo spirito.

Mario Sola, prezidanto UECI

(el Katolika Sento 4/1996)

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942
e-mail : katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Francesco FAGNANI, Via Bartolomeo Eustachi 47, 20129 Milano
Segret./Cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Convento del SS.Redentore Piazza S. Francesco, 1 Pergine Valsugana (TN)

Responsabile dei congressi: G.CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) - tel. 02.66301958

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, via Santa Bernadette 6, 00167 Roma

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 3492191838

Consigliere: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consigliere: Giovanni GAZZOLA: Via Cendrole, 32 - Spineda, 31039 Riese Pio X (TV)

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECl.

Associato ordinario con Katolika Sento (SO)	€ 22,00
Associato giovane con Katolika Sento (SG)	€ 11,00
Associato familiare senza Katolika Sento (SF)	€ 11,00
Associato ordinario con Espero Katolika (SOE)	€ 43,00
Associato sostenitore senza Espero Katolika SS)	€ 44,00
Associato sostenitore con Espero Katolika (SSE)	€ 65,00
Offerta minima per Katolika Sento (AK)	€ 10,00
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	€ 21,00

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato.

Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono € 2,10 per l'associato ordinario e € 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I. codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

***Se Dio estas la Dio de la vivo - kaj Li estas tia -, al ni ne estas permesite mortigi fratojn je Lia nomo.
Se Dio estas la Dio de la paco - kaj Li estas tia -, al ni ne estas permesite militi je Lia nomo.
Se Dio estas la Dio de la amo - kaj Li estas tia -, al ni ne estas permesite malami la fratojn.***